

# Martinus-Centro

Klint · Danio

2014.07.26 - 08.02

# Kurso pri la Kosmologio de Martinus en Esperanto





26 julio -
2 aŭgusto
2014



# Bonvenon al Martinus-Centro, Klint!

1 Esperanto-Semajno

26 julio -
2 aŭgusto
2014

## La semajna temo: Nia rilato al Dio

Ŝajne Dio estas objekto de kredo. Se Dio ekzistas, eblas science esplori Dion. Tamen la eterna flanko de la vivo bezonas sian propran sciencon. La spirita scienco montras, ke amo estas la baza tono de la vivo kaj la vojo al reala scio. Nova intuicia percepto kreskas en ĉiuj kaj faros la ĉeeston de Dio neskuebla fakto.

La prelegoj estos simultane interpretataj en Esperanton. La Esperanta semajno okazos samtempe kaj paralele kun dana, sveda, angla, germana, nederlanda kaj hispana en internacia etoso.

| Prelegoj interpretataj je la 9.30 | |
|---|---|
| **Dimanĉo** | Dio kaj la scienco<br>*Tryggvi Gudmundsson* |
| **Lundo** | Kosmaj gvidantoj<br>*Solveig Langkilde* |
| **Mardo** | La senco de la vivo<br>*Rune Östensson* |
| **Merkredo** | Kio okazas post la morto?<br>*Lene Jeppesen* |
| **Ĵaŭdo** | Preĝi – dia kapablo<br>*Anne Külper* |
| **Vendredo** | La signifo de pardonado<br>*Sören Grind* |

## Pri la kosmologio de Martinus

- Ĝi donas logike bazitajn respondojn al multaj fundamentaj demandoj pri la vivo.
- Ĝi povas motivigi optimisman vivsintenon, kaj doni bazon por harmoniaj kaj simpatiaj rilatoj al ĉiuj homoj kaj ĉio viva. Tiel ĝi povas kontribui al la progresigo de la humana evoluo de la homaro.
- Laŭ la analizoj en La Tria Testamento ”ĉio estas tre bona” el *eterna* perspektivo. Ili ankaŭ donas defendon al ĉiuj homoj, kiuj ĉiuj senescepte nur povas agi laŭ siaj ĝisnunaj spertoj.
- La kosmologio igas ”alturni ankaŭ la alian vangon” kaj ”ami sian proksimulon kiel sin mem” scienco kaj ĝi montras ke ni ĉiuj iĝas pli kaj pli amemaj kaj saĝaj, vivon post vivo.
- Ne ekzistas iaj ceremonioj aŭ membreco rilate al la kosmologio de Martinus.



**Alveno, informado kaj forvojaĝo**
Alveno, sabate la 26-an de julio post la 12-a horo. Bonvenigo kaj informado, sabate je la 19:30 en studĉambro n-ro 8. Forvojaĝo, sabate la 2-an de aŭgusto.

**Prezoj por unu semajno – sen manĝoj**

| | | |
|---|---|---|
| 1-lita loĝejo kun necesejo kaj banĉambro | 2.950 | DKK |
| 1-lita ĉambro kun komunaj necesejo kaj banĉambro | 1.400 | DKK |
| 2-ĉambra loĝejo (2 personoj) kun necesejo kaj banĉambro | 4.100 | DKK |
| 2-ĉambra loĝejo (2 personoj) kun komunaj necesejo kaj banĉambro | 2.000 | DKK |
| 2-ĉambra loĝejo (3-4 personoj) kun komunaj necesejo kaj banĉambro | 2.700 | DKK |
| Somerdomo (4 personoj) kun necesejo kaj banĉambro | 3.800 | DKK |
| Somerdomo (3 personoj ) kun necesejo kaj komuna banĉambro | 2.900 | DKK |
| Kampadejo – por unu plenkreskulo | 600 | DKK |
| Kampadejo – por unu infano 5-12 jara | 300 | DKK |
| Semajna kurskotizo por unu persono | 1.025 | DKK |

Mantukoj kaj litaĵoj estos lueblaj en la akceptejo.

**La taga programo**

- 09.30 Prelego (simultane interpretata en Esperanton)
- 11.00 Studgrupoj
- 16.00 Konversacia rondo
- 17.00 Manĝo en restoracio nomata La Teraso
- 19.00 Prelego en Esperanto aŭ distro en la prelegejo
- 20.00 Teo kaj kukoj en La Teraso

**Manĝoj**
Je la 17-a horo eblas vespermanĝi varman vegetaran manĝaĵon kun salato kontraŭ 80 DKK en "La Teraso", hejmeca vegetara restoracio de la centro. Vespere eblas amikumi kaj pludiskuti en "La Teraso", kie aĉeteblas teo, kafo, frandindaj kukoj kaj glaciaĵo. En ĉiuj loĝejoj kaj ĉambroj oni povas mem prepari manĝaĵon. En la kampadejo disponeblas komuna kuirejo.
(Manĝoj ne estas inkluditaj en la malsupre indikitaj prezoj.)

**Kiel trovi Martinus-Centron en Klint**
De Kopenhaga Centra Stacio (Københavns Hovedbanegård) unue per trajno al Holbæk. Tie necesas ŝanĝi trajnon, al Højby aŭ Nykøbing Sjælland. De tie al Martinus-Centro per aŭtobuso n-ro 563 aŭ per taksio. La vojaĝo de Kopenhago al la urbeto Klint daŭras ĉirkaŭ tri horojn.



*Mapo de Selando (Sjælland)*

Por aliĝi, bonvolu skribi al Martinus-Instituto aŭ esperanto@martinus.dk.

**Semajna kurskotizo por unu persono 1.025 DKK**

**Por gastoj: Prelego 70 DKK**










## Martinus-Centro, Klint

Klintvej 69, Klint · DK-4500 Nykøbing Sj. · Danio

Tel. +45 59 30 62 80 · Repoŝto: esperanto@martinus.dk

www.martinuscenter.dk

## Martinus-Instituto

Mariendalsvej 94-96 · DK-2000 Frederiksberg · Danio

Tel. +45 38 38 01 00 · Repoŝto: esperanto@martinus.dk

www.martinus.dk · shop.martinus.dk



Published by The Martinus Institute. Printed on The Martinus Institute, October 2013